

Nia trezoro: Baudouin de Courtenay

Artikolo de Andreas Künzli el "La Balta Ondo" (<http://sezonoj.ru/2013/03/221trezoro/>)

Inter la plej fruaj eminentaj lingvosciencistoj, kiuj aprobis kaj subtenis la planlingvan ideon kaj la lingvon Esperanto, estis Jan Niecisław Ignacy Baudouin de Courtenay (1845–1929). Naskita en Radzymin apud Varsovio en familio kun francaj-polaj radikoj, Baudouin de Courtenay studis en Germanio kaj poste laboris kiel profesoro pri slavistiko en universitatoj de Ruslando, kie li estis nomata Ivan Aleksandrovič Boduen de Kurtene. Pro politikaj motivoj, nur en 1918 li povis esti dungita de la Varsovia universitato.

Baudouin de Courtenay estis unuavice talenta kaj sindona fakulo pri malnova pola lingvo, pri hindeŭropaj lingvoj kaj slavaj dialektoj, precipe slovenaj. Efektivigante siajn lingvajn studojn, Baudouin persone vizitis fremdajn landojn por esplori lokajn idiomojn en rekta kontakto kun la indiĝenoj. En sia laboro li aplikis ne nur lingvistikajn metodojn, sed ankaŭ matematikajn formulojn, natursciencajn eksperimentojn, psikologiajn spertojn kaj sociologiajn rimedojn. Pro siaj avangardaj ideoj li konfliktis kun la “jungramatikistoj” (Brugmann, Leskien). Per siaj modernaj teorioj li malfermis al la lingvistiko kvazaŭ revoluciajn opciojn kaj perspektivojn, precipe en la semantiko, semiotiko, semasiologio, morfologio, fonetiko, fonematiko kaj psikofonetiko, same kiel en la antropofoniko, sonfiziologio, dialektologio, psiko- kaj socilingvistiko kaj lingvopatologio, kaj pretigis la vojon al la strukturismo en la lingvistiko.

En sia politika agado Baudouin postulis la egalrajtan traktadon de la etnoj, la separadon inter ŝtato kaj eklezio, la agnoskon de sennacieco kaj senreligieco kaj pledis kontraŭ naciismo, ŝovinismo kaj antisemitismo. Sian nekutiman civitanan kuraĝon Baudouin pagis per malamikaj reagoj flanke de ŝtataj kaj akademiaj instancoj kaj per la portempa perdo de siaj libereco kaj laborposteno.

Unuan kontakton kun la universala lingvo Baudouin de Courtenay probable havis ĉirkaŭ 1884. Tiam li laboris en la universitato de Dorpat (Tartu, Estonio). En la “Delegacio por la adopto de internacia helplingvo”, fondita de Louis Couturat kaj Louis Leau en 1901, Baudouin fariĝis kun Otto Jespersen vicprezidanto de ties Komitato, kies tasko estis ekzameni la taŭgan planlingvan solvon. Kiel konate, la Komitato elektis en principo Esperanton kiel proponotan universalan helplingvon, tamen ne sen postuli kelkajn reformojn en tiu lingvo. Kiam la Lingva Komitato, la plej alta lingva instanco de la Esperanto-movado, rifuzis efektivi la postulatajn reformojn, estis publikigita en 1907 la reformlingvo Ido. Tio kondukis ne nur al movada skismo, sed ankaŭ al la ekŝigo de Baudouin el la Komitato, ĉar li opiniis, ke Ido signifas “malprogreson” kompare kun Esperanto. Kvankam laŭ liaj propraj klarigoj Baudouin de Courtenay iom scipovis kompreni kaj legi Esperanton, li avertis la publikon, ke li ne konsideras sin esperantisto, nek estas adepto de ia ajn alia internacia helplingvo.

Baudouin de Courtenay verkis kelkajn signifajn artikolojn pri la planlingva demando, kiuj aperis en esperantistaj kaj nacilingvaj periodaĵoj. Lia unua ĉi-tema artikolo probable estis tiu,

kiu aperis en la efemera Peterburga gazeteto *Esperanto* de I. Ostrovskij en 1905. Liaj tri ĉefaj artikolaj kontribuadoj pri planlingvoj, kiuj estas prezentindaj, estis publikigitaj en la jenaj gravaj revuoj:

En *Analoj de la naturfilozofio* (Lepsiko, 1907), Baudouin de Courtenay ne nur rifuzis la asertojn de la lepsikaj jungramatikistoj Karl Brugmann kaj August Leskien (ĉe kiu Baudouin doktoriĝis), kiuj opiniis, ke la konscia perhoma kreado de artefaritaj lingvoj ne eblas kaj ne decas, sed li donis ankaŭ la unuan kompetentan sciencajn pritakson de Esperanto. Aparte li laŭdis en ĝi la okulfrapan regulecon de la gramatika, fonetika, grafika, morfologia kaj sintaksa strukturoj kaj substreki la evidentajn lingvajn avantaĝojn de Esperanto kompare kun la naturaj lingvoj. Esperanton li pritaksis kiel nek tro latinecan nek tro artefaritan lingvon. Lia ĉefa kritiko pri Esperanto koncernis la regularon, laŭ kiu en ĉi tiu lingvo la ina formo estas derivita de la vira formo (ekzemple: patro/patrino, knabo/knabino ktp.) kaj laŭ kiu la inverso estas formita per la sufikso mal-. El ideologia vidpunkto Baudouin estis konvinkita, ke Esperanto povus servi kiel rimedo de la paco kaj unuecigo de la popoloj.

En sia ampleksa ruslingva artikolo aperinta en 1908 en la aldonado *Espero* de la Peterburga kleriga ĵurnalo *Vestnik Znaniĵa* Baudouin de Courtenay ankoraŭfoje resumis la ideojn kaj avantaĝojn de la planita internacia helplingvo per konvinkaj argumentoj, emfazante aparte la propedeŭtikan kaj pedagogian valorojn de Esperanto. Samtempe li admonis la esperantistojn, ke ili ne ripetu la erarojn de la volapukistoj kaj ne konsideru sian lingvon supereca kaj netuŝebla. Esperanton mem li konsideris ankoraŭ ne tute matura internacia helplingvo kaj opiniis, ke ĝia perfektigo devus esti la tasko de la lingvoscienco.

En artikolo aperinta en *Pola Esperantisto* en aprilo 1909 Baudouin de Courtenay okupiĝis pri kelkaj “riproĉoj farataj al la lingvoj internaciaj ĝenerale kaj al Esperanto aparte”. En ĉi tiu brila teksto li plene rifuzis plendojn, kiuj koncernis la asertojn, ke Esperanto estas “ne unuforma lingva miksaĵo” kaj “elpensita fikcio” kaj ke en ĝi estas “malfacile reprodukti frazeologion”. Kaj li konkludis, ke “vanaj estas la timoj de diversaj skeptikuloj, esprimataj rilate al Esperanto”, pri kiu li cetere kredis, ke ĝi ne disfalos en unuopajn idiomojn kiel siatempe la popola lingvo latina.

Kiam en 1916 en Petrogrado estis fondita la societo Kosmoglot, en kiu aktivis grupo de kuriozaj planlingvistoj, Baudouin de Courtenay estis nomita ĝia honora prezidanto. Okaze de speciala kunveno omaĝe al Zamenhof en aprilo 1918 en Petrogrado, Baudouin ankoraŭfoje plenimprese emfazis la signifon de la nobla morala-etika verko de la mortinta aŭtoro de Esperanto, kiun li konis persone. Kiam Baudouin de Courtenay forpasis en novembro 1929, Leo Belmont honoris en patosa nekrologo de *Pola Esperantisto* la malaperintan scienciston kiel “gloran kunlaboranton de komunaj eŭropaj lingvoscienco kaj kulturo” kaj kiel “grandan patrioton kaj veran homaranon”.